

NORDFRANCA

ESPERANTISTO

(PIKARDA STELO - NORDA GAZETO - ANTAŬEN)



MONATA REVUO

de la Nordfrancaj Esperantistoj

Publikigas la sciigojn de la Norda Federacio
kaj de la Grupoj

REVUE MENSUELLE

des Espérantistes du Nord de la France

Publie les renseignements
de la Fédération du Nord et des Groupes



Redakto kaj administraj: 33, rue Marceau
ROSENDAEL - LEZ - DUNKERQUE (Nord)

C. VERNAY, Direktoro

G. VANHOVE, Administranto

M. DELAVIGNE, Respondeca redaktoro

Redakta Komitato, redaktas

Jarabono : Francujo 7 frankoj

altaj landoj : 6 respondkuponoj aŭ egalvaloro

POŬTĈEKKONTO : LILLE 403-50

NORDFRANCA ESPERANTISTO

Monata Revuo de la Nordfrancaj Esperantistoj

PROPAGANDO
PROPAGANDE



INSTRUADO
ENSEIGNEMENT




AKTUALAĴO
ACTUALITÉ



LITERATURO
LITTÉRATURE

Kopirajto de la enhavo rezervita. Manuskriptojn kaj sciigojn oni devas sendi nur al tiu adreso: **C. VERNAY, MALO-LES-BAINS (Nord)**. Ni ne resendas la manuskriptojn. — La Redakcio rezervas al si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn. — *Les auteurs sont seuls responsables de leurs articles.*



Samideanoj !

Commandez vos CARTES DE VISITE, de préférence à l'imprimeur de votre Bulletin...

Imprimerie Commerciale

LONGPRÉ-LES-CORPS-SAINTS (Somme)

Tous les Imprimés
nécessaires aux Groupes

CARTES DE VISITE

le 100 : 10 francs — les 50 : 7 francs
avec étoile verte : 1 franc en sus

ENVELOPPES - le 100 : 5 francs

Envoi franco contre mandat-poste
Contre remboursement : 1 fr. 50 en sus
Prière d'écrire lisiblement
et de bien indiquer le prénom



N^o 1. Eugène Flambarck

2. M^{me} & M^{lle} Léa

3. M^{re} & M^{lle} GUILLAUME

4. PIERRE TRANCARD

LIVRAISON DANS LES 24 HEURES



S-ro Firmin DURIEUX

Honora Prezidanto
de la Esperantista Federacio de Norda Francujo



NORDFRANCA ESPERANTISTO

deziras al ĉiuj legantoj
sukcesan kaj feliĉan novjaron

Niaj Pioniroj...

FIRMIN DURIEUX

Tre oportunan ideon havis la sindonema samideano kiu zorgas pri tiu-ĉi nia gazeto, volante ke ĝiaj unuaj numeroj honore prezentu al la legantaro tiujn el la « malnovuloj », kiuj estris nian movadon en la norda regiono.

Ne nur estas juste honori tiujn, kiuj ĝis nun « tenis la torĉon » kaj esprimi al ili ĉies dankemon pro ilia grava — ĉiam neprofitema — laboro, sed povas esti taŭge kaj fruktodone montri imitindajn ekzemplojn al la « novuloj », kiuj iufoje emas kredi ke nia movado komenciĝis nur de l' tago kiam ili mem « ekesperantiĝis ».

Inter tiuj, kiuj plej vigle laboris por Esperanto en nia regiono, decas citi — sur la unua vico — tiun, kiu estis la unua prezidanto de nia federacio : nia respektata majstro kaj amata gvidinto, S-ro Durieux.

Firmin DURIEUX naskiĝis la 21^{an} de januaro 1857, en vilaĝo de la Lille-a ĉirkaŭaĵo. Li estis instruisto kaj poste lernejestro. Lia spirito ĉiam pasie interesiĝis pri la pedagogiaj demandoj. Nian lingvon li lernis dum la jaro 1898 kaj li tuj komprenis kiom valora ilo povis iĝi Esperanto en la manoj de klera edukisto. Per senĉesa klopodo, li sukcesis konvinki pri tio sian inspektoron kaj kun liaj permeso kaj aprobo, enigis Esperanton en la lernejon kies direktoro li estis.

Sur la benkoj de tiu lernejo — la lernejo Montesquieu, en Fives, apud Lille — sidis, inter centoj da junuloj, knabo en kiu la bona semo majstre ĝermis : tiu knabo — kiu multe grandiĝis — estas nia senlaca kunbatalanto René CURNELLE.

Dum ses jaroj, ĝis la mondmilito, S-ro Durieux — helpata de sia edzino kiu estis lia komprenema kaj altanima kunlaborantino — daŭrigis tiun gravan praktikan provon, kiu plene sukcesis. Pri tiu grandskala « eksperimento », S-ro Durieux skribis gravegajn raportojn, kiuj nerefuteble pravas la profiton, kiun povas alporti la enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

En la jaro 1907, S-ro Durieux fondis kun kelkaj kolegoj la « Internacian Asocion de Instruistoj » kaj ĝian organon, la *Internacian Pedagogian Revuon*.

La 28^{an} de junio 1908, la nordaj geesperantistoj, kunvenintaj en Armentières, decidis krei la « Esperantistan Federacion de Norda Francujo ». Unuvoĉe, S-ro Durieux estis elektata kiel federacia prezidanto : laŭ ĉies opinio, li nekontesteble estis la plej taŭga, la plej kompetenta, la plej « inda » el ni.

Dum pluraj jaroj, li tenis, kun aŭtoritato kaj sindonemo, la direktilon de nia federacia ŝipo. Kiam li lasis tiun direktilon en la spertaj manoj de S-ro Ernest DELIGNY, li estis elektata honora prezidanto de nia federacio. Nia elkora deziro estas ke li konservu ankoraŭ tiun honoran titolon dum tre multaj jaroj.

Mi ĉi-supre nur parolis pri la « esperantisto » : mi nun aldonas kelkajn vortojn pri la « homo ».

Por tiu, kiu vidas lin unufoje, S-ro Durieux aspektas kiel severa homo : la senrida vizaĝo, la larĝa barbo, la rekta rigardo tra la okulvitroj naskas fortan impreson. Sed, tuj kiam li ekparolas, milda kaj patra voĉo aŭdiĝas, kaj oni komprenas ke tia voĉo povas aparteni nur al akresentema, grandanima, bonvolema, bonkora homo. La okul-

roj kaj la barbo malaperas kaj oni vidi nur la koron, kiu akiris altan vertecon, sed konservis mirindan ĉecon kaj dudekjarulan entuziasmon.

Tion skribante, mi nepre ŝokos un eminentan amikon — kiu estas plej modesta el la homoj — sed mi estas certa esprimi la profundan amon de ĉiuj liaj disĉiploj (inter kiuj mi fieras stari) en kies koroj estas neforigebla por li tiom da respekto, da dankemo kaj da amo.

S-ro Durieux ĝuas nun, en Cusset apud Vichy, post longa kaj meritplena kariero, pacan kaj pravan emeriteton. De malproksime, sed atente kaj ameme, li rigardas al niaj penoj en nia regiono, ĉar li restis tutkore « nordano ». Feliĉiga konstato estos certe por li vidi ke ni ne forgesas, kaj ke ni, kuraĝe, daŭrigas la fondon de la sulko kiu li ekfosis sub la griza ĉielo de norda Francujo.

Albéric HUMEZ.

PENSOJ

La lastaj ne estaj tiuj, kiuj montras la direkton.

Bjornson B.



La tutmonda paco ŝajnas esti neatingebla, sed mi firme kredas — kaj mi ne estas sola, kiu havas tiun konvinkon, — ke iam venos la tempo, kiam la stelo de la paco ekbrilos super la kompatinda homaro. Kaj mi deziras, ke la virinoj, precipe la virinoj, ĉiuj kaj ĉie, helpu realigi tiun revon.

Moudrà Pavla.



Riĉaĵo similas al sterko : disjetila ĝi utilas al ĉiuj.

Tolstoj L. N.



Homaj deziroj similas al sala akvo : ju pli oni trinkas, des pli oni soifas ; ju pli multe oni havas, des pli multe oni deziras.

Konfucius.

APPEL A NOS ABONNÉS

Voici le 3^e numéro de NORDFRANCA ESPERANTISTO entre vos mains.

Nous espérons que vous trouverez ce bulletin aussi attrayant que les précédents et que vous constaterez avec joie que notre revue soutient efficacement « notre mouvement » et vous renseigne utilement sur l'action menée avec vigueur par les Espérantistes du Nord de la France.

Notre but ? REALISER.

Votre concours nous est indispensable. Vous êtes, c'est un fait, nos approbateurs et nos amis de la première heure. Tous les « samideanoj » doivent s'abonner à notre bulletin.

Qui, de vous, parmi vos amis Espérantistes, ne peut recruter au moins un abonné ? Voilà une belle occasion d'offrir des étrennes à Nf. E.

Nous organisons, du 1^{er} au 30 janvier, un grand concours d'abonnements.

Pour faciliter le recrutement, nous maintenons, pendant cette période, le prix de l'abonnement à 7 francs. L'augmentation du prix du papier et des charges d'impression nous font une obligation, après cette date, de porter ce prix à 10 francs.

Espérantistes ! à l'action, pour que puisse vivre Nf. E.

A ceux de nos abonnés qui nous transmettront au moins 2 abonnements, nous offrirons une pochette de 10 cartes postales du joli dessin de notre samideano Birembaux : « L'Astronome et l'Etoile espérantiste ».

Pour 5 abonnements, nous offrirons 25 de ces cartes, avec impression du nom de l'expéditeur.

Enfin, à l'abonné qui nous transmettra le plus grand nombre d'abonnements pendant cette période, nous offrirons, en sus, la collection reliée de Nf. E. (de novembre 1936 à décembre 1937).

KURAGE ANTAÛEN ! pour la vie de notre bulletin.

En lertaj manoj

Kun granda korgojo, mi ricevis la unuan numeron de Nordfranca Esperantisto.

Antaŭ kvar jaroj, kiam mi alprenis de S-ro Deligny la taskon zorgi pri la eldono de Norda Gazeto, mi certe antaŭvidis la malfacilaĵojn de la laboro: sed, tiutempe, mi kvazaŭ loĝis en Malo, kaj ofte vizitis tiun urbon. Plue, mi fidis je la valora helpo de nia lerta, agema sekretario, amiko E. Houzé kaj mi sciis ke, dank'al li, la entrepreno povos esti daŭrigata laŭ la ĝisnuna sukceso atingita de nia antaŭulo.

Pro familiaj okazintaĵoj, en la jaro 1934, mi devis forlasi la loĝejon en Malo, kaj la veturado iĝis por mi pli malfacila. Malgraŭ mia deziro partopreni kiel eble plej multe la laboron, mi devis forlasi la plej grandan parton al la Dunkerqu'aj amikoj, kiuj sukcesis progresigi la aferon. Norda Gazeto regule aperadis.

Abonantoj, kiuj ricevas ĉiumonate sian gazeton, ne ĉiam konscias kiom grava estas la laboro necesigata de la eldono. Verko de artikoloj, kolekto de la grupaj informoj, regulo de la presotaĵoj, korektigado de la presprovoj estas la unua parto; poste faldado, enkovertigo, alskribo de adresoj, poŝtigo! Intertempe, korespondado, ricevo de abonkosto, k. t. p., estas okupadoj sufiĉe tempo-uzantaj por ne-profesiaj gazetistoj, kiuj ankaŭ devas zorgi atente pri la elspezoj, por ke la abonkosto ne estu tro alta.

Samtempe, en nia norda regiono, aperis du aliaj bultenoj, ambaŭ tre satindaj kaj ege ŝatataj, tio estas Antaŭen kaj Pikarda Stelo. Ofte, mi aldis S-ron Vernay plendi pri la troa laboro, sed, ĉu mi povas kredi iun, kiu ĉiam ridetas? Kompreneble, la redakta parto de la tri bultenoj estis ĝenerale malsimila, kvankam ili infoje devis represi la samajn informojn: sed la laboro por sendo, kaj la materia tasko estis trioblaj. Kiom da tempo perdita!

Kaj mi pensis ankaŭ pri la abonantoj. Multaj el ili, certe, dezirus legi la tri gazetojn, sed, ankaŭ la elspezoj estus trioblaj, kaj tro gravaj. Mi alprenis al la konkludo, ke estus bona afero por ĉiuj: redaktoroj, helpantoj kaj legantoj, se estus ebla atingi unuecon kaj unuiĝon: pri tio, mi interparolis kun S-ro Houzé.

Nun, tiu projekto estas efektiva, dank'al la bonvolo de ĉiuj interesuloj: nune nova sango povos traktari la vejnojn de la Federacio. Neniu el la anoj de la grupoj povas nei la gravecon de tiu fakto por nia progreso: ĉiuj amase devas helpi la bonvolulojn. La lerta divido de la laboro inter fervoraj samideanoj, kiuj jam donis pruvojn al la movado estas certigo de bona verko: la entrepreno estas en lertaj manoj, kiuj ne lasos fali la ilojn.

Ni ĉiuj alportu al ili efektivan aprobon, se ne kunlaboradon; la malgravaj oferoj, kiujn ni povos konsenti, estos ĉiam ne

kompareblaj kun ilia laboro. En kora konsento de ĉiuj, la Federacio, kiu estas jam unu el la plej gravaj organizaĵoj en la mondo, plue prosperos.

Je la momento, kiam novaj, pli junaj fortoj forprenas de miaj ŝultroj la pezojn, mi konscias pri la malgranda valoro de mia laboro: mi esperas, ke tamen ne estis neutila, kvankam la ŝtono kiun mi alportis al la konstruaĵo ne estis granda. El la fundo de la koro, mi deziras al la posteuloj la plej grandan sukceson, ili ja estas indaj!

P. BENOIT,

Eks-Redaktoro de Norda Gazeto.

Por instrui la demandajn vortojn

Hieraŭ	Karlo	pro	malsato	kase
Kiam?	Kiu?	Kial?	Kiel?	
prenis	unu	ruĝan	pomon	
	Kiom?	Kia(n)?	Kio(n)?	

en la ĝardeno de la najbaro.

Kie? Kies?

A. vd. STARRE
(Nederlando).

FANTAZIO

A la aboco, ĉiu konas ja ĝin
B la bubaĉo, kiun amas patrin'
C ceĵano tiom bela la flor'
Ĉ ĉerizo kun la ruĝa kolor'
D diablo jen la ĉef' de l' flamar'
E esperanto por la tuta homar'
F fundamento en la krestomati'
G la giganto kiu mangas por tri
Ĝ estas ĝibo sur la dors' de l' kamel'
H honestulo suferanta en ĉel'
Ĥ la ĥirurgo kun la akra tranĉil'
I la ideoj kiuj venas po mil'
J januaro en komenc' de la jar'
Ĵ jamboreo por la monda skoltar'
K la kantado kiun aŭdas vi nun
L estas luno radiaro de l' sun'
M monotona ĉia estas ĉi-kant'
N estas nimfo en la mar' ĉe la strand'
O oratoro via ledanta ĝis fin'
P estas plago ĉia estas edzin'
R redaktoro diktator' ĉe gazet'
S estas sabro kiun portas kadet'
Ŝ ŝovinismo, ĝi fariĝas idol'
T en komenco de la vorto tavel'
U overturo ĝin koncernas muzik'
Ŭ en diftongo temas pri fonetik'
V jen la venko akirebla per far'
Z Zamenhof kiun dankas l' homar'.

A. vd. Starre.

A nos abonnés Amateurs Photographes

Nous avons le plaisir de faire connaître à nos abonnés que la Société éducative, artistique et littéraire « L'Activité Intellectuelle du Calaisis » organise une Grande Compétition Internationale de Photographies d'Amateurs, du 1^{er} janvier au 30 septembre 1937, et qu'elle réservera des prix spéciaux à nos abonnés, à la condition que les amateurs photographes espérantistes joignent à leurs œuvres SIX BANDES des bulletins de janvier à juin 1937.

Pour tous renseignements, s'adresser à M. G. MASSON, président, 96, rue Hermant, Calais.

Kiu deziras korespondi?

S-ro GÖSTA LAURIN, Kavlingeavagen 24, en LUND (Svedujo). Estas pentristo kaj deziras korespondi pri ĉ. t. kun francano.

S-ro René WISSART, P. T. T., 15, rue des Vierges, DOUAI (Nord) Francujo, deziras korespondi kun fraŭlino de Centra-Eŭropo.

S-ro Gérard SIMOËNS, 60, rue Myron-Herryk, TOURCOING (Nord) Francujo, deziras korespondi kun ges-oj el ĉiuj landoj.

★ Preparu valizon...

La XVIII^a Nordfranca
Federacia
Esperanto-Kongreso

= en AMIENS =
la 2^{an} de Majo 1937

Jam denun
SENDU KOTIZON (5 fr.)
al F-ino A. COLLÉATTE,
17, rue Le Mongnier, Amiens

Detalaj sciigoj pri la Kongreso aperos
en nia februara numero



Ne sufiĉas legi vian bultenon. Vi devas ankaŭ paroli pri ĝi al viaj amikoj kaj konatoj. Ĝia sukceso estos via sukceso.



Ni ! la Komencantoj !

— Verda kato ! Verda kato ! Kiu estas vi ?

— Mi estas Mis-Ti-Gri, filo de Mi-A-U la bona patrino.

— Ha ! Jes Mi-A-U kiu mangas ĈIU-SEMAJNE multajn musojn en mia GRENEJO ?



— Jes, Sinjoro SCIVOLEM.

— Ĉu vi ANKAŬ ĉesas la grizajn, malgrandajn bestojn, Verda Kato ?

— Ha ! Ne Sinjoro Scivolem, mi ne havas tempon...

— Kion faras vi dum la tago kaj dum la nokto ? Ĉu vi ĈIAM dormas ?

— Ne, Sinjoro Scivolem. Kontraŭe mi NENIAM dormas, mi SENCESE malfermas la okulojn kaj rigardas la mondon !

— Kio estas vi, stranga KVAR-PIEDULO ?

— Mi estas amiko de la Esperantistoj, PRECIPE de la komencantoj. Dum la nokto mi promenas sur la TEGMENTOJ kaj ATENTE mi rigard-



as la ĉielon por trovi la novajn verdajn stelojn.

— Ĉu vi havas bonajn OKULOJN, kara amiko ?

— Ho, jes Sinjoro Scivolem kaj KIAM mi ne bone vidas, mi rigardas per la astronomia VIDILO de mia NAJBARO.

— Bona ideo, vi estas MALICEMA Mis-Ti-Gri ! Kaj dum la tago ?

— Dum la tago, estas alia afero Sinjoro Scivolem... Mi iras al la LERNEJO.



— Al la lernejo ? Ĉu vi estas lernanto ? Ĉu vi preparasekzamenon ?

— Ne ! En la lernejo OKAZAS esperanta konversacio ĈIUDIMANĈE. TIAM, mi staras sur la tablo kaj levas la dorson kaj

la VOSTON. La profesoro parolas al mi kaj montras min al la sinjoroj kaj al la fraŭlinoj. La fraŭlinoj ŝatas mian belan koloron kaj mian agrablan MIENON. TIE mi vidas mian amikinion, la muson !

Vian amikinion ! Mi ne komprenas !

— Estas la ĉokolada muso kiu loĝas en la flava skatolo. Ĝi estas dolĉa muso, ĝi ne TREMAS kiam ĝi vidas min. Sed mi scias ke, en la ĉambro sidas KNABINETOJ kiuj rigardas AVIDE la malfeliĉan brunan beston !



— Kion faras vi, Mis-Ti-Gri, kiam ne estas konversacio en la lernejo ?

— Mi iras al la domo de la novaj esperantistoj kaj mi rigardas ilin. Mi vidas kion ili faras por Esperanto. Kelkaj legas la novan gazeton kaj skribas frazojn sur kajero. La aliaj rigardas la malgrandan flavan « ŝlosilon » por lerni novajn vortojn. Ili estas bonaj novaj lernantoj. Mi amas ilin, mi havas grandan koron !

— Ĉu vi ne vizitas la malnovajn esperantistojn, Mis-Ti-Gri ?



— Jes ! Jes ! Mi metas mian verdan nazon en la KESTON de la LETERPORTISTO. Mi rigardas kiajn leterojn ricevas la membroj de nia grupo kaj kiam mi vidas FREMDLANDAJN POŝTMARKOJN kaj strangajn nomojn sur la KOVERTOJ, mi tre ĝojas. Mi estas feliĉa ankaŭ, ho ! tre

ĉion kiam ĉarmaj fraŭlinoj kantas esperante : (1)

Knabino ĉe vilaĝo
Kun kato, kato, beleta kat'
Knabino ĉe vilaĝo
ZORGADIS pri ŜAFARO-ro
Zorgadis pri ŝafar'.

Ekfaris ŝi fromaĝon...



TIAM, mi fermas miajn okulojn, mi faras dolĉan muzikon

RRO, RRO, RRŬ

kaj mi revas... revadas... verde kaj esperante !

Ĝis revido...

Verda Kato 

KLARIGOJ

Lernejo : école ; grenejo : grenier ; ej : lokoj kiu montras lokon - lieu ; scivolem : curieux ; sencese : sans cesse ; kvarpedulo : individu à quatre pattes ; vidilo : lunette ; leterportisto : facteur ; fremdlanda poŝtmarko : timbre - poste étranger ; atente, avidece, sencese, verde

(1) Laŭ la franca ario : Il était une bergère...

esperante : e montras adverbojn kiuj esprimas la manieron.

Bonvolu vi memeri la aliajn klarigojn en la numeroj 1 kaj 2, aŭ en vortaro (dictionnaire) por la simplaj vortoj. Se tamen vi ne komprenas, skribu al « Verda Kato ». Ĝi certe respondos kun granda plezuro.

CONSEIL IMPORTANT : Lisez et relisez à haute voix ce dialogue avec un « samideano » qui vous donnera la réplique comme au théâtre ou en conversation, accentuez fortement l'avant-dernière syllabe de chaque mot et articulez toutes les lettres : ce sera un admirable et efficace encouragement à la parole.

Esperanto-Movado en Danujo

Antaŭ 3 jaroj Esperanto estis tre malmulte konata en Danujo. Preskaŭ neniuj kursoj okazis kaj la malnovuloj kiuj restis fidelaj, kun bedaŭro devis konstati ke nia movado estas kiel ŝipo en drondanĝero, se la helpo baldaŭ ne venus, ĝi pereus kun sia tuta ŝarĝo. Feliĉe oni aŭdis la S. O. S.-kriojn kaj oni sukcesis savi la dronantan ŝipon. Oni devis ĝin rekonstrui, sed oni tamen savis ĝin.

Post akra batalado fondiĝis en 1933, Dana Esperanto-Instituto. Ĝia tasko estas la sama kiel tio de ĝia « patrino » : dungi eksterlandajn instruistojn, por gvidi ĉseh-kursojn, prizorgi lokan propagandon, krei taŭgajn profesorojn por la enlandaj ĉseh-kursoj kaj por la sendo de danaj profesoroj eksterlanden. Depost tiu momento, la movado komencis flori en nia lando. 6 fremdlandaj ĉseh-profesoroj gvidas kurson en diversaj partoj de Danujo, dum vintr'o. Krom tiuj vintraj kursoj okazas ankaŭ someraj, elementaj kaj perfektigaj en la plej belaj regionoj de nia lando. Krom la ĉiujaraj kursoj en la bela dana urbo Silkeborg (la perlo de Danlando) oni en ĉi-tiu jaro disponigas la Internacian Altheracon en Elsinoro por la aranĝo de Somera Esperanto-Universitato.

Se vi partoprenos unu el tiuj kursoj, vi havos la plej bonan okazon ĝui la somerajn tagojn en la plej bela regiono de Danujo kaj tre malmultekoste 10-taga restado en Elsinoro kostas nur 165 fr. por kurso, manĝo, k.t.p.

Tiuj kiuj legis *Hanlet*, de Shakspeare, jam iom konatiĝis kun Elsinoro. Ĝi estas ĉarma urbeo situanta ĉe la markolo inter Svedujo kaj Danujo. Se vi ĝin vizitos, ne forgesu viziti ankaŭ ĝian tombejon. Tie vi vidos kortuŝan monumenton de 40 francaj militkaptitoj kiuj ripozas... « sur une terre amie sans avoir pu revoir leur patrie trépassée. Le Danemark reconnaissant veille sur leur tombeau... »

Utiligu la okazon por viziti kaj pasigi libertempon en internacia samideana rondo kaj perfektigi en Esperanto. Vizitu Danlandon, la landon de rideto, vi certe ne bedaŭros tion.

G. HANSEN.

Vivo de la Grupoj

AIRAINES. — Ont obtenu « Atesto pri lernado »: *Mlle Yvette Revel, MM. Delafosse et Monchaux. Félicitations spéciales à Mlle Revel qui obtient le maximum de points et à M. Monchaux qui, malgré ses 71 ans, se mil courageusement à l'étude de l'Espéranto dès l'ouverture du cours du groupe.*

AMIENS. — F-ino Gertrud Hansen faris tre interesan prelegon pri la Danlando en la Urbodomo, lunde la 21^{an} de decembro.

— Por perfektigi en la uzado de la lingvo, la grupanoj kunvenas ĉiuvendrede.

La kursoj: elementa, kiu okazas merkrede en la Urbodomo kaj perfektiga en la Industria Societo, bone daŭras.

ALBERT. — Kunveno okazis la 20^{an} de decembro ĉe s-ro Joachim, place de la Basilique. S-roj Caron kaj Bourdon akceptis propagandi en la urbo por aranĝi kurson kiel eble plej baldaŭ. S-ro Brunet disdonis gramatikojn, traktojn kaj ekzemplerojn de *Nordfranca Esperantisto*.

ANZIN. — Dimanĉe la 6^{an} de decembro honore al nia Majstro D-ro Zamenhof kaj por adiaŭ nian Cseh-profesorinon f-inon Hansen, ni kunvenis ĉirkaŭ la manĝotablo bone provizita. Estis kun ni s-ro Guillaume el Paris, f-ino Andrée el Lille, s-ino Mannevy kaj s-ro Aldebert el Fresnes, f-inoj Héois, Wattier kaj s-ro Richard el Wallers, s-ro Caffiaux el Salut-Sauve, s-ro Henry el Denain kaj multaj gesamideanoj el Valenciennes-a regiono. Kompreneble, nia rondo estis gaja. Kantoj, spritaĵoj, ŝercaĵoj spicis nian festenon. Ope ni iris al la dancejo antaŭtataj de nia verda standardo; tie okazis balo organizita de la Anzinaj frizistoj.

Oni bone rimarkis nian rondon kaj tiel senlace ni dancis, kiel bonhumore ni festenis.

La 15^{an} de decembro okazis sukcesplena prelego de f-ino Hansen, pri d-ro Zamenhof, liaj vivo kaj verko.

ARMENTIÈRES. — La A. grupo kunvenas denove en sia kutima sidejo « l'Excelsior » ĉiulunde, kaj klopodas por starigi, post la novjaron, E.-kurson por komencantoj, gvidotan de ĝiaj anoj instruistoj.

Oni studas ankaŭ la eblecon aranĝi E.-ekspozicion, kaj eble E.-balon. — J. R.

ARRAS. — La elementa kurso kaj la aliaj tri ĉiusemajnaj kunvenoj okazas regule kaj kontentige.

— Merkrede la 16^{an} de decembro la grupo akceptis f-inon Hansen. Komuna vespermanĝo okazis je la 19^{an}; ankaŭ s-ro Laloux, prezidanto de la grupo en Mareuil partoprenis ĝin. F-ino Hansen prelegis pri Danlando, en komerca ĉambro; lumbildojn prezentis al ni nia amiko Stuit; li parolis

poste pri d-ro Zamenhof, S-ro Brunet disdonis diplomojn al la ekslernantoj de la Cseh-kurso. S-ro Charmette, je la nomo de la novaj anoj, donacis belan libron al s-ro Brunet, legante pro tio altstile redaktitan komplimenton.

Kondolencoj. — Nia sindona profesoro s-ro Collot, kiu de tiom longe instruas en elementaj kursoj, suferis fortan baton pro la perdo de la edzino, kiu mortis la 12^{an} de decembro. Ni ĉiuj prezentas al s-ro kaj f-ino Collot niajn sincerajn kondolencojn.

Erratum. — Dans notre dernier numéro, page 10, sous la rubrique Arras, lire: M. Jonquier, et non Jonquait comme il a été imprimé par erreur.

AVESNES. — Ĵaŭde la 19^{an} de decembro okazis malfermo de nova kurso. Ses novaj kaj sep malnovajn lernantoj regule ĉeestas ĝin, kiu okazas ĉiuĵaŭde, je la 20^a. Gvidantoj estas: s-ro Raymond Couteaux, vicprezidanto de la Tribunalo kaj s-ro Ernest Mariez.

BÉTHUNE. — Dank'al senlaca laboro de f-ino Sven kaj s-ro Benoit, ŝajnas ke la grupo baldaŭ revigliĝos. Komence de januaro, s-ro Brunet vizitos la fidelulojn por nova propagando, aranĝo de kursoj, restarigo de grupkunvenoj, k.t.p.

BOULOGNE-SUR-MER. — La direktorino de la Knabina Komerca Lernejo en Boulogne klopodas por disponigi al ni klasĉambron por niaj kursoj. Ni esperu ke ŝi sukcesos.

En nia familio. — Ni gratulas plejkore s-ron Duchochois, honoran prezidanton de la Esperantista Grupo « Verda Stelo », okaze de la bapto de lia dua pranepo. Ni deziras al la feliĉa praavo — Unua Kongreso, kiu restas ĉiam aktiva pioniro de nia Movado — longan kaj sukcesplenan vivon.

CAUDRY. — La esp. grupo « Verda Stelo » ĵus aliĝis al nia Federacio.

Ĝia komitato konsistas el: honora prezidanto s-ro Normand; prezidanto, s-ro Capier; vicprezidanto, s-ro Bricourt; sekretario, s-ro F. Depreux, 266, rue de Saint-Quentin, Caudry; kasisto, s-ro Leclercq; membroj, s-ro Blanchart, f-ino Grassart, s-ino Claisse.

— La ambaŭ kursoj: por komencantoj kaj perfektiga, gvidataj de s-ro Bricourt, (11 bis, rue Aristide-Briand, Caudry), okazas ĉiumerkrede en la lernoĉambro de la lernejo rue Victor-Hugo, je la 20^a. Tre regule 20 gelnantoj ĉeestas la kursojn.

— La 10^{an} de januaro, je la 11^a, en la salono de la urbo, okazos prelego de s-ro Centnersver pri d-ro Zamenhof, liaj vivo kaj verko.

DESVRES. — La 1^{an} de decembro en la Urbodomo okazis prelego de s-ro Stuit, pri Nederlando, kun lumbildoj; (70 ĉeestantoj) kaj la 2^{an}, en la Supera Lernejo prelego de s-ro Stuit pri la Esp. literaturo.

DESVRES (daŭrigo).

— Biblioteko estas starigita; ĝi enhavas 24 librojn.

— La du kursoj bone funkciadas. 50 novaj adeptoj lernas Esperanton (tiun kurson gvidas s-ino Paquentin); 20 daŭrigantoj kun s-ro Dumarquez.

DOUAI. — *En nia familio.* — Ni gratulu... Sona kaj forta infaneto naskiĝis, filo de gesinjoroj Warusfel, al kiuj ni varme gratulas. Facilan kreskadon kaj estontan feliĉon ni deziras al la estonta esperantisto.

DUNKERQUE. — S-ro Nogé kaj f-ino Spyns daŭre sukcesas en la du bonege vizitataj kursoj.

— F-ino G. Hansen interese prelegis la 1^{an} de decembro, pri Danujo, antaŭ 120 grupanoj.

— S-ro Scherer, el Los Angeles, gajigis per anekdotoj la ĉiumardan konversacian vesperon la 15^{an} de decembro. La 16^{an}, li komentaris 200 lumbildojn pri Ĉinujo antaŭ 230 gejunuloj de du ŝtataj kaj unu katolika gimnazioj kuniĝis en la festsalono de la urbodomo (la tri direktoroj tre laŭdis kaj gratulis).

Samtage, sed vespere, tre interesa prelego pri Japanujo, sen traduko. Ĉeestis pli ol 100 grupanoj, inter ili pluraj ne plu viditaj de longa tempo estis ĝoje retrovitaj.

Ĵaŭde, kun traduko, sama prezentado en la sanatorium (sanigejo) de Zuydcoote, antaŭ 300 kuŝantaj malsanuloj kaj 100 sidantoj, en grandioza salonego. Tondra aplaŭdo pro la tre interesa kaj amuza prelego.

Vendrede 18, en la kunveno de Fotografista asocio, kun traduko, tre sukcesinta prezentado de 200 bildoj pri « tra Usono en



Revenante de la Koncerto...

Li. — Cu vi konas la plej belan stelon?

Ŝi. — Jes! Ĝi estas la brila stelo en la ĉielo.

Li. — Ne. Divenu. Ŝi. — Mi trovis. Vi volas diri la Ama Stelo!

Li. — Jes! kaj ĝia fratino?

Likajŝi. — Estas la belega Esperantista Stelo en nia koro!

DUNKERQUE (daŭrigo).

ruliĝanta hejmo». Multaj bildoj treege belaj estis spontanee aplaudataj kaj la klarigoj forte plaĉis.

Ni esperas ke meze de marto, s-ro Scherer povos dediĉi denove du aŭ tri tagojn al nia urbo antaŭ ol reiri al Ameriko.

— Sabate 19^{an}, bone sukcesinta treege vizitata festo Zamenhofa.

— Dum januaro, oni antaŭvidos unu aŭ du tre bonajn prelegojn.

Detalaj informoj aperos en la ĉiudimanĉa kroniko de la loka gazeto.

FRESNES. — *Le groupe compte maintenant quatre mois d'existence. Depuis le 11 novembre 1936, une soixantaine d'élèves suivent régulièrement les cours professés par M. Centnersver.*

L'idéal espérantiste gagne de plus en plus nos concitoyens.

Le Comité étudie en ce moment les moyens d'intensifier encore plus la propagande. Nous espérons qu'avec l'appui des sociétaires, il mènera son œuvre à bien et que, pour l'année nouvelle, les élèves des cours passeront la centaine.

HAUTMONT. — *Les cours hebdomadaires ayant été un peu irréguliers depuis la grève en cours, nous sommes informés qu'ils ont lieu de nouveau régulièrement à l'École Professionnelle, chaque samedi à partir du 12 décembre.*

LENS. — Ĵaŭde la 17^{an} de decembro okazis en la Lernejo, rue Carnot, la prelego kun lumbildoj de f-ino Hansen, pri Danujo. Nia Cseh-metoda profesoro, s-ro Stuit, tre bone projekciigis la bildojn; ĉeestis ĉirkaŭ 50 entuziasmaj geesperantistoj. S-ro Max varme dankis, en la nomo de la grupo, la prelegantinon.

La kurso de s-ro Stuit tre bone progresas. Baldaŭ ĝi finiĝos kaj dum la ĝenerala kunveno de la grupo, kiu okazis la 21^{an} de decembro, oni preparolis la aranĝon de la perfektiga kurso.

LILLE. — La 28^{an} de novembro la simpatia blindulo, s-ro Masselier, faris al ni la grandajn honoron kaj plezuron viziti nian grupon, ĉeestante nian sabatan kunvenon. Post kelkaj vortoj pri sia libreto kun kantoj, s-ro Masselier kantis por ni siajn kantadaptojn de francaj popolantoj. Kune kun li ni baldaŭ kantis bone ekkaptitaj per la varmeco de lia animo. Same kiel en li kun li, rigardante interne de ni mem, sen luno kelke da momentoj el la tempo pasigita en ia regiono, subite revivigita en nia memoro. Kiam deflugis de niaj lipoj la lasta petalo de lasta floreto de la bukedo, kun supirbedaŭro, ni adiaŭis lin. Ĉi-tie, s-ro Masselier, bonvolu akcepti nian sinceran dankon pro via afableco kaj via altvalora instruado. Kiu vidis kaj aŭdis s-ron Masselier senhezite dezirus renkonti kaj aŭdi lin denove.

(daŭrigo paĝo 13)



En nia Federacio

Prezidanto : S-ro Albéric HUMEZ, 13 ter, rue Morel, à Douai
Sekretario : Jak. CENTNERŠVER, 9, rue Ferrand, à Valenciennes

Kunveno de la federacia Komitato en Douai la 6^{da} de Decembro

1. Malferras la kunsidon, s-ro Humez per mallonga parolado en kiu li salutas la multnombrajn alvenintojn petas ke oni parolu laŭeble nur en Esperanto, ne nur en la kunveno, sed ankaŭ en la urbo kaj ke la diskutoj estu koncizaj por ne perdi tempon.

2. Ni ricevis leteron kun senkulpiĝo de la jenaj gesamideanoj : F-ino Barret (Valenciennes), s-ino Mommaerts (Anzin), s-oj Demelin (Boulogne), Roelens (Armentières). S-ro Deligny invitas la venontan Komitatan kunvenon en Saint-Omer.

S-ro Dumarquez (Desvres) esprimas sian opinion pri kelkaj punktoj de la tagordo.

S-roj Nogé kaj Alglave komisiis F-inon Spyns (Dunkerque) klarigi la motivojn de ekzistenco de s-ro Nogé, kiel federacia radiodelegito.

S-ro Naoumoff (Parizo) perletere kaj s-ro Brunet, parole, pritraktas la skizmon en U. E. A. kaj la kreon de I. E. L. Post klarigo de s-ro Humez kaj interveno de s-ro Cent, la Komitato decidis ne starigi nun tiun demandon sur la tagordon sed nur post kiam la afero definitive klarigos; ĝi esprimas deziron ke la gvidantoj ne nia movado trovi kiel eble plej rapide kontentigan solvon de tiu problemo.

Por montri sian simpatian al nia federacio kiel li estis antaŭ kelkaj jaroj sekretario, s-ro Naoumoff donacis al ĝi 100 frk. La Komitato varme dankas la donacinton.

3. En la nomo de Douai grupo, s-ino Humez transdonas la pokalon « FERVORIGILO » al s-ro Broutin, kiu kun s-ro Buroufosse reprezentas la grupon de Pont-sur-Sambre, gajninton de tiu belega artaĵo. Tiu solena ago estas kompreneble akompanata de interŝanĝo de afablaj paroladetoj.

4. *Raporto pri la funkciado de diversaj fakoj de la Federacio :*

IZOLULOJ. — S-ro Brunet (7, rue Saint-Michel, Arras) okupiĝas pri izoluloj en Pas-de-Calais kaj Somme ; li estas petata okupiĝi de nun ankaŭ pri izoluloj en Nordo. Tiumaniere li fariĝas sekretario federacia por tiu servo. Korespondelspezoj koncerne tiu fakon estas al li repagataj.

RADIO. — F-ino Spynsklarigas la motivojn de la ekzistenco de s-ro Nogé kiel sekretario de tiu servo : a) manko da tempo ĉar li gvidas du kursojn en Dunkerque ; ĉar s-ro Houzé akceptis gvidi unu el tiuj kursoj, la motivo forfalas ; b) por protesti kontraŭ la nesufiĉa kunlaboro de grupaj radiodelegitoj, kiuj ne sendas al li regule raportojn kaj dankesprimojn al radio-stacioj post esperanto-disatidigo.

S-ro Cent proponas ke antaŭ la 20^a de ĉiu monato la sekretario de ĉiu grupo sendu al li kun sia raporto presota en *N. E.* ankaŭ raporton de aliaj grupaj faktestroj. La ĝenerala sekretario kolektos tiujn raportojn kaj sendos ilin al la koncernaj federaciaj faktestarioj.

F-ino Spyns aprobas tiun ideon kaj aldonas ke estas prefera ke la ĝen. sekr. presigu specialan demandaron, dissendotan al ĉiuj gruposekretarioj, kiun ili resendos al li post la pleniĝo antaŭ la 20^a de ĉiu monato.

La Komitato esprimas siajn plejsincerajn dankojn kaj gratulojn : al s-roj Nogé kaj Alglave pro ilia celkonscia laborado sur tiu tre grava kampo kaj pro bonega gvidado de tiu fakoj, unu el la plej bone funkciaj en nia federacio ; al F-ino Andrée kaj s-ro Curnelle, esperanto-radio-geparolantoj de Lille-a radiostacio.

BIBLIOTEKO. — La Komitato aprobas la proponon de s-ro Cent okupiĝi ankaŭ pri tiu servo. Denun, bonvole sendi al li abonpeton. La bibliotekisto varme dankas s-inon Lotthé, el La Capelle, kiu donacis al nia biblioteko interesan dikojn kaj belaspektan verkon « *SI* ». Imitinda ekzemplo.

EKSPOZICIO. — Antaŭ unu jaro, dum sia kunveno en Lens, la Komitato decidis ke se iu faktestro ne alsendos dum tri sinsekvaj kunvenoj raporton pri sia fakoj, li aŭtomate ekzigos. Konsekvence, la Komitato proponas al s-ino Volqueman (36, rue Turgot, Lille) gvidi tiun servon. Estas necese renovigi la materialon, en unu lokon kolekti ĝin.

S-ro Stuit rimarkigas, ke la ekspoziciita dum la Komerca Foiro en Lille materialo ne estis sufiĉe interesa kaj alloga. Jam denun oni devas prepari taŭgan materialon por la Esperanto-budo de la venontjara foiro.

GAZETARA SERVO. — Funkciaj kontentige sub la gvidado de s-ro Houzé (Esperanto, Dunkerque). Li liveras ĉiajn propagandajn artikolojn al la postulantoj.

PRELEGANTOJ. — Kelkaj ĉeestantaj grupgvidantoj fiksas surloke daton de la prelego de F-ino G. Hansen (pri Danlando) kaj de s-ro Cent (pri Varsovio, urbo de la XXIX^a U. K.). Sed la plimulto de grupoj deziras aranĝi prelegojn nur dum marto kaj aprilo, kiam la komencantoj kapablos aŭskulti prelegantojn sen traduko. Tiel longa prokrasto ne estas absolute necesa, ĉar la geprelegantoj estas rektmetodaj geprofesoroj, kiuj scias paroli al komencantoj rekte en esperanto.

5. *Dusemajna propagando de SFPE.* — Kun bedaŭro, ni devas konstati ke, en nia regiono, ĝi pasis preskaŭ senehe. La kartoj

de membroj-aproboj disvendiĝas malfacile pro sufiĉe alta prezo (2 fr.). La Komitato esprimas la jenajn dezirojn : a) ke la prezo estu nur 1 fr. pokarte. Kompense oni povus duobligi la nombron de la vendotaj kartoj ; b) ke la premio ne estu vojaĝo al kongresurbo, sed ke oni starigu multajn diversvalorajn lotaĵojn ; ĉar en nia regiono la loĝantoj tre ŝatas loterion, la sukceso estas deantaŭe garantiata. Tamen la formo de la loteri-biletoj (kartoj de membroj-aproboj) povas resti la sama.

S-ro Cent memorigas ke la dissenditaj al la izoluloj kartoj devas alporti al la federacio monprofiton.

6. *La venonta Komitato Kunveno* okazos en Saint-Omer la 7^{an} de marto 1937.

7. *Diversaj demandoj.* — S-ro Brunet proponas ke la ĉefaj grupoj kreu « distriktan intergrupon » dum kies monataj kunvenoj oni parolus nur en esperanto pri diversaj aferoj koncernantaj nian movadon.

S-ro Cent varme rekomendas al grupgvidantoj abonigi ĉiujn senescepte anojn kaj komencantojn al nia federacia bulteno : *Nordfranca Esperantisto*. Por vivi ĝi bezonas efektivan kunlaboradon moralan kaj materialan subteon de ĉiuj. Pro la plikariĝo de papero, la abonprezo 7 fr. restos nur ĝis la 31^a de januaro. Post la novjaro, ĝi devos esti, bedaŭrinde, altigata ĝis 10 fr.

Senprokraste abonu, abonigu viajn amikojn, kaj serĉu anoncojn.

Post tiu alvoko, s-ro Vernay, kolektis novajn abonojn.

Vivo de la Grupoj (daŭrigo)

LILLE (daŭrigo).

— La 19^{an} de decembro, je 20^h30, la grupo aranĝis prelegon de F-ino Hansen, sed ŝi ne alvenis. Sed, kiel ĉiam, oni bone amuziĝis en samideana rondo.

— La 20^{an}, ŝi parolis antaŭ la mikrofono de P. T. T. pri la Esperanto Movado en Danujo.

MALO-LES-BAINS. — F-ino Kiesecoms sindone daŭrigas la gvidadon de la elementa kurso, ĉiuvendrede vespere, en la urba biblioteko, rue Clemenceau, kun tre bona sukceso.

SAINT-OMER. — En la urbo la kurso okazas ĉiumerkrede, je la 19.15, kun 10 lernantoj.

— Ĉiumonate, kunveno de la malnovaj lernantoj por kuna interparolado kaj ludoj.

— S-ro Delcourt, prezidanto de la Civila Tribunal, sukcesis la ekzamenojn kaj akiris Ateston pri Kapableco. Li daŭrigas sian studadon. Li ĉeestis perfektigan kurson de pastro Cseb dum pasinta aŭgusto en Arnhem.

En januaro kun varma apogo de la liceestro s-ro Delcourt intencas organizi interesan kurson por komencantoj.

— S-ro Deligny gvidas kurson ĉiulunde en la liceo por la lernantoj de la pasinta jaro.

SAINT-POL-SUR-MER. — S-ro Lasuye gvidas nun du kursojn : elementan ĉiujade, perfektigan ĉiusabate, je la ĝenerala kontento.

WALLERS. — *Le groupe espérantiste, qui fut créé il y a un an, a déjà la sympathie de toute la population. La municipalité qui aide moralement et financièrement le groupe, donne un précieux appui ; elle a également mis à l'ordre du jour, pour la prochaine réunion du Conseil Municipal, d'émettre un vœu pour que l'Esperanto soit introduit dans les écoles et à rendre, en même temps, hommage au génial inventeur de cette langue : D-ro Zamenhof.*

— *Cette année, 24 élèves fervents et assidus suivent les cours qui sont dirigés par M. Centnersver — M. M.*



IZOLULOJ

faktestro : S-ro BRUNET, 7, rue Saint-Michel, Arras

S-ro Brunet dissendis :

1. Ĉiuj izoluloj, membroj kaj eksmembroj de la federacio ;

2. Traktoj, foliojn G. P., N. E. al tiuj kiuj petis informojn ;

3. Apartajn personaĵojn leterojn al izoluloj kiuj loĝas 5, 6, 7 ope en la sama urbo (Tourcoing, Cambrai, Albert, Montdidier, Bercq...), instigante ilin aranĝi kunvenon, kunagadi por krei grupon. Li petis de ili rendevuon por komenci viglan agadon.

Ĉiuj respondis favore, krom Cambrai, kiu tamen promesis helpon se oni sukcesus fari ion.

Leteroj estis senditaj ankaŭ al lernejestroj kaj ĝinstruistoj en Carvin, Lillers, Auxilley - Château, Doullens, por ke ili provu aranĝi kaj gvidi kurson kaj krei grupon ;

4. Li petis s-ojn Flaczynski kaj Bialasik el Houdain ke ili provu revigligi grupon en Bethune, ke ili gvidu tie kurson. Li petis s-on Lemichez krei grupon en Don, kaj s-on Desmarest en Hesdin ;

5. Ĉiuj, kiuj deziras havi propagandan materialon povas sin turni al S-ro Brunet.

Esperanto-kalendaro por 1937

Nia amiko Delavigne, presisto de *N. E.*, ĵus eldonis tag-foliaran kalendaron, kies plato (formato 22-13) prezentas fotografiojn de nia Majstro, la saman kiun ni publikigis en la decembra bulteno.

Tiu belaspekta kalendaro devas trovi lokon en ĉiu esperantista hejmo.

Ĝia neta prezo (sen gajno por la eldonisto) estas 2 fr. 50 plue rekomend-afranko (1 fr. 40).

Turnu vin al S-ro Delavigne, Longpré-les-Corps-Sainls (Somme).

KURAGĖ ANTAŬEN ! (1)

La mil naŭcent tridek sesa jaro mortis!
Vivu la mil naŭcent tridek sepa !

Karaj gesamideanoj, bonan novan jaron al ĉiuj. Bonan verdan jaron mi deziras al la tuta esperantistaro kiu fervore laboras en ĉiuj landoj de la mondo por divastigi niajn pacaĵn kaj fratecajn ideojn.

Kion alportos al ni tiuj novaj dekdu monatoj ? Mistero ! Certe, en la ĉielo, kolektiĝis multaj malhelaj nuboj, lastempe. Sed Januaro kronata per visko kaj illekso salutas nin tre afable kaj ŝajnas diri :

« Forgesu la malbonajn tagojn, jen estas mi, mi alportas al vi ĝojon kaj esperon ; sekvu min sen timo ; la estonteco apartenas al la kurajaĵoj homoj, al la animoj ekentuziasmiĝataj pri idealo... Revivigu vian fidon, streĉu vian volon : kurage antaŭen ! Bonan novan jaron ! »

Fino de jaro perfekte taŭgas por esplori malnovajn paperaĵojn : mi pastego ŝatas tiun distraĵon... (ĉu vi povas dubi pri tio ?) Oni ne povas ĉiam pedante rezonadi ! Mi trovis por vi tre malnovan rakonteton.

Ĉu vi deziras ĝin legi ?

★

Mi aŭdis paroli pri ŝtelisto kiu eniris en domon kie loĝis riĉa viro. Li deziris tie ŝteli kaj supreniris sur la tegmento de la domo. Alveninte, li aŭskultis atenteghe por esti certa ke neniu plu maldormis en la domo kaj ke li povis agi sen danĝero.

Sed la dommastro ekvidis tre bone la ŝteliston. Tuj li havis ideon lerte trompi lin. Tute mallante, li diris al sia edzino :

« Demandu al mi, tre laŭte, de kie venis la riĉeco kiu permesas al mi tiel bone vivi nuntempe. Ne lasu min ripozi antaŭ mi tion estu rakontinta. »

La edzino demandis laŭte :

— Kara edzo, pro la dia amo, diru do al mi, kiel vi plenakiris vian riĉecon kaj vian posedaĵon. Neniam mi vin vidis komercadi aŭ fariĝi procentegisto por tiom gajni. Mi ne scias kiel vi akiris ĉion kion vi posedas.

— Vi malpravas, respondis li, demandante tiun aĵon. Faru je via volo per la bienoj kiujn Dio pruntedonis al vi.

Tiam, si pli kaj pli multobligis la demandojn kaj klopodis por ĉion scii. La saĝa viro faris multajn malfacilaĵojn por kousesti al tio kion ŝi demandis. Fine, kvazaŭ per devigo, li sciigis al ŝi de kie venis lia riĉeco :

— Mi estis iam ŝtelisto, li diris, kaj estas tiamaniere ke mi fariĝis riĉa.

— Kiel do vi ŝtelis ? Neniu, neniam kulpigis vin.

(1) Por la progresemuloj.

Mia mastro iustruis sorĉon al mi. Kiam li estis sur la tegmento de la domo, li ripetis sepfoje ian vorton. Poste mi kisis lunradion kaj malsupreniris en la domon kie mi forprenis sen malfacilaĵoj ĉion kion mi deziris. Kaj, kiam mi volis foriri, mi ripetis sepfoje la magiajn vortojn, mi kisis denove la lunradion kaj reiris supren kvazaŭ per ŝtopetaro.

— Instruu al mi tiujn vortojn, mi petas ! diris ŝi.

— Ili estas tre facilaj, li respondis. Estas la vorto : « Saul », sepfoje ripetata. La vortoj diritaj, la lunradio portis min tre komforte kaj en la domo kie mi ilin elparolis nek grandulo, nek malgrandulo vekigis.

— Per sankta Petro, diris la virino, jen estas sorĉo kiu valoras grandan trezoron. Se jam mi havas amikon aŭ parencon kiu ne povas vivi alimaniere mi iustruos al li tiun metodon kaj mi certe pliriĝigos lin.

La lerta viro diris tiam al sia edzino ke ŝi devis silenti kaj ekdormi, ĉar li sufiĉe maldormis kaj estis lacega. Ŝi lasis lin ripozi kaj li ekkomencis ronki. Kiam la ŝtelisto tion aŭdis, li kredis la riĉulon dormanta. Li ne forgesis la vorton... Li ĝin ripetis sepfoje, kisis lunradion, al ĝi envolvis siajn piedojn kaj siajn manojn... kaj falis teren. Tie li rompis sian dekstran femuron kaj ankaŭ la maldekstran brakon.

La lunradio tre malbone lin portis

La saĝa riĉa viro, vekiganta ŝajnis timigita pro la bruo kaj demandis :

— Kiu faris tian skandalon ?

— Mi estas ŝtelisto, diris la alia, kaj, malfeliĉe, mi aŭdis vian paroladon. Via sorĉo tiel bone portis min ke mi estas vundita kaj mortonta.

Oni subite prenis la ŝteliston kaj oni tajkuris alvoki la juĝistaron por lin al ĝi fordoni.

★

Tre utila recepto

(*preĉipe post la novjaraj festotagoj*)

Ankaŭ trovita en malnovaj paperaĵoj.

Kuraci la podagron, miaj iufanoj ? Jen !

Prenu la noztukon de maljuna kvindekjara fraŭlino kiu neniam pripensis la edziniĝon ; purigu ĝin en la muelilo interkluzo de muelisto kiu neniam miksigis ĝipson al sia faruno ; sekigu ĝin en la ĝardeno de iu bankisto kiu neniam ŝtelis ; markstampu ĝin per iuko prenita el la inkujo de iu advokato kiu neniam mensogis pledeante ; transdonu ĝin al iu kuracisto kiu neniam mortigis iun el siaj malsanuloj ; poste, nur poste, frotu per ĝi la malfeliĉan podagron...

Provu tiun recepton, kaj saligu al mi la rezulton.

BONAN KURAGĜON.

Via fidela

FLANDRA ANTIKVAĴO.

Dans la Presse française

De L'ECLAIREUR DE NICE :

UNE OPINION

Alors que dans la « Tribune des Nations », M. Armory écrit à propos de la langue internationale un article où l'humour involontaire se mêle à une documentation évidemment superficielle, M. Lavergne, professeur à la Faculté de Droit de Lille écrit :

« L'immense effort fait dans les collèges et lycées de tous les pays d'Europe pour apprendre aux enfants une ou deux langues étrangères échoue misérablement, exception faite de rares sujets bien doués et qui, leurs classes secondaires terminées, poursuivent les longues années ces études linguistiques. Aussi, de pays à pays, même entre personnes cultivées occupant dans leurs nations des positions intéressantes, l'obstacle que constitue la différence des langues demeure très réel.

« On ne peut, dès lors, que juger très sévèrement l'indifférence coupable dont les Gouvernements d'Europe témoignent vis-à-vis de l'emploi d'une langue auxiliaire tout à la fois aussi perfectionnée et aussi facile à apprendre que l'esperanto.

« L'esperanto, de par sa technique d'une simplicité géniale, peut et doit nous donner cet avantage auquel le latin n'a jamais pu atteindre : permettre, non pas seulement aux élites, mais à de larges couches de populations, de se comprendre et de se parler. Aussi, parmi les moyens les meilleurs de pacification des peuples, l'idiome inventé par le docteur Zamenhof revêt-il, à notre sens, une valeur hors ligne. »

Et disons qu'au lieu de laisser un de ses collaborateurs aligner tant de... préjugés contre l'esperanto, « La Tribune des Nations » ferait mieux d'imiter son homologue anglais, « European Herald », qui lui n'hésite pas à l'utiliser, et s'en trouve bien.

G. AVRIL.

Du PROGRÈS DE LA SOMME :

L'ESPERANTO, ELEMENT DE CULTURE

Bien que cela ne soit pas son but, l'esperanto peut servir d'élément de culture. Les plus grandes institutions mondiales l'ont reconnu. La plupart des membres de l'enseignement sont parfaitement d'accord sur ce point.

En effet, l'esperanto ne tolère pas de sous-entendus obscurs ou douteux comme les langues nationales. Si l'on tombe à l'improviste dans une conversation en langue nationale, on ne sait toujours comprendre le sens exact d'un mot, avant que de comprendre le sens général des propos. Par exemple, en français, si on entend : « Les étudiants de la Faculté sont licenciés », on ne sait pas s'ils ont

reçu le grade de licencié ou l'ordre de ne plus mettre les pieds à la Faculté.

L'esperanto, langue mondiale, ignore toutes ces fantaisies de la mode, car cette langue doit être comprise partout, à tout moment, et de la même manière. L'esperanto a fait ses preuves, déjà pendant plus d'un quart de siècle. On sait que l'expérience est à cet égard parfaitement concluante.

L'esperanto restitue au mot sa valeur exacte, ou plutôt il traduit le mot selon son exacte valeur. On s'habitue vite à cette précision raisonnée. L'esperanto est donc une école de style.

De plus, l'esperanto peut servir à apprendre les langues étrangères, parce qu'il fait analyser toutes les phases et que ses racines sont internationales. On dit souvent que « l'esperanto est la clef de toutes les langues ».

29^e CONGRÈS ANNUEL D'ESPERANTO

En août 1937, à l'occasion du cinquantième de l'esperanto, le Congrès universel se tiendra à Varsovie, d'où le docteur Zamenhof lança sa première brochure. Les organisateurs commencent déjà la préparation de ce congrès qui promet d'être des plus brillants. Une très belle affiche a été éditée ; des notes pour conférences sur la Pologne, avec clichés de projection, vont paraître incessamment. Les groupes et organisations qui désiraient en user sont priés de demander les uns et les autres au Comité d'organisation, rue Chmielna, 26, Varsovie.

INSIGNE ET DRAPEAU ESPERANTISTES

Au moment où la mode est aux insignes, il est utile de noter que l'insigne esperantiste est sans doute le plus ancien de tous les insignes portés actuellement. Cet insigne, qui est adopté par tous les adeptes de la langue de Zamenhof, est une étoile à cinq pointes (une pointe pour chaque partie du monde). L'étoile est de couleur verte (espérance) sur fond blanc.

Le drapeau esperantiste, qui porte dans un angle la reproduction de l'insigne, est aujourd'hui connu dans le monde entier. Il a été créé à Boulogne-sur-Mer, ville dont la réputation esperantiste a été acquise lors de la tenue du premier Congrès international universel d'esperanto, en 1905.

Pour tous les esperantistes, ce drapeau est le symbole de la Paix.

COURS PAR CORRESPONDANCE ET T. S. F.

Tous renseignements sont donnés par la S. F. P. E., 34, rue de Chabrol, Paris 10^e (Joindre timbre pour réponse). Demandez au plus tôt les conditions du concours entre élèves pour le voyage à Varsovie.

Komparo de la vortfarado en Esperanto kaj la Germana

Kaj Esperanto kaj la germana lingvo estas lingvoj posedantaj tre *vivo*plenan vortfaradon. Ĉiu homo bone scianta la germanan lingvon povas fari novajn vortojn en ĝi kaj ĉiu esperantisto povas formi novajn vortojn en esperanto. Male estas en la franca lingvo komparo inter la vortfarado en esperanto kaj la germana montras ke ambaŭ lingvoj procedas laŭ la samaj principoj, tio estas: unue la kunmetado de vortoj kaj due la derivado helpe de afiksoj. Ekz.: Lese—buch = lego—libro; Frei—heit = liber—eco. Mi neglektas en la komparo tiujn germanajn afiksojn, kiuj ne plu estas vivaj, per kiuj oni do hodiaŭ ne plu povas fari novajn vortojn kaj la germanan vortfaradon helpe de ŝanĝo de radik-vokalo (apofonio), ekz.: finden = trovi, fund = trovaĵo, ĉar la apofonio hodiaŭ ne plu ludas grandan rolon en la germana vortfarado.

La kunmetado estas farata en la germana laŭ la samaj principoj kiel en Esperanto. La lasta vorto de la kunmetaĵo reprezentas la ĝeneralan signifon kaj la unua vorto donas al ĝi specialan signifon. Ekz.: en Haustüre dompordo. La vorto pordo ricevas specialan signifon de domo kaj pro tio diferencigas de ĉiuj aliaj pordoj. Oni povas kunmeti en ambaŭ lingvoj substantivojn kun substantivoj, substantivojn kun adjektivoj, verbojn kun adverboj, adjektivojn kun verboj, k. t. p. Fakte ĉiujn vortkategoriojn oni povas kunmeti. Ekz.: garden—urbo = Garten—stadt; lingvo—scienco = Sprach—wissenschaft; lum—turo = Leucht—turm; ĉef—urbo = Haupt—stadt; vel—boato = Segel—boot; paper—korbo = Papier—korb; al—veni = an—kommen; for—veturi = fort—fahren; ĉirkaŭ—iri = um—gehen; kun—labori = mit—arbeiten; el—trovi = heraus—finden; nov—naskita = neu—geboren; mort—bati = tot—schlagen; liber—pensulo = Frei—denker; laŭt—paroli = laut—sprechen; vivo—forta = Lebens—kräftig; amo—plena = liebe—voll; ekster

prefiksoj:

ho—	Schwieger—	hopatrino = Schwieger—mutter;	bofilino = Schwieger—tochter
dis—	per—zer—	disdoni = per—teilen;	disŝiri = zer—reißen
ge—	ge—	gefratoj = Ge—schwister	
mal—	un—	malfelica = un—glücklich	
mis—	miss—	misuzo = miss—gebrauch;	miskompreni = miss—verstehen
re—	zurück—	resendi = zurück—senden	

sufiksoj:

—ajo	—er—	gravaĵo = Wichtiges
—ano	—er—	Berlinaano = Berliner
—aro	—ge—	montaro = Ge—birge; arbetaro = Gestrauch
—ebla	—bar—	mangebla = ess—bar
—eco	—e—heit—keit—	fideleco = Treu—e; beleco = Schön—heit
—ejo	—ei—	bakejo = Bäckerei; presejo = Druckerei
—eto	—lein—chen—	libreto = Büch—lein; infaneto = Kind—chen
—igi	—igen—	purigi = reinigen (kaj multaj aliaj afiksoj)
—ilo	—el—	ŝlosilo = Schlüssel; ĉizilo = Meissel
—ino	—in—	reĝino = Königin; leonino = Löwin
—isto	—er—	bakisto = Bäcker; lavistino = Wasch—er—in
—ulo	—ling—er—	junulo = Jüngling; dikulo = dieker

—lando = Aus—land; grand—anima = gross—mütig; rapid—vagonaro = Schnell—zug; kaj milfoje plu.

Ĉiuj cititaj ekzemploj estas tiaj, kiuj estas ekzakte same formitaj en esperanto kaj en la germana. La kaŭzo de tio estas unue ke oni en du malsamaj lokoj farante la saman laŭ la samaj principoj atingas la samajn rezultojn kaj due la esperantaj kunmetaĵoj ofte estas imititaj laŭ la germanaj modeloj. La liston de tiaj paralelaj kunmetaĵoj en esperanto kaj en la germana mi povus daŭrigi tra multaj paĝoj.

La germana lingvo tre ŝatas siajn kunmetaĵojn kaj eĉ formas ilin el pli ol du eroj, ekz.: Last—wagen—führer = ŝarĝ—aŭtomobil—ŝoforo. Teorie oni povas fari kunmetaĵojn el senfine multaj vortoj, sed oni konsideras tion malbona stilo: La burokrata stilo ĝuas certan malbonan famon pro emoj al tro longaj kunmetaĵoj. En esperanto la longeco de la kunmetaĵoj ankaŭ ne havas limon teorie sed praktike kunmetaĵoj el pli ol du eroj estas maloftaj kaj frekvente oni eĉ evitas du-erajn kunmetaĵojn, ekz.: anstataŭ preĝejtegmento oni diras preĝeja tegmento aŭ tegmento de preĝejo. La nordaj lingvoj kaj la angla ankaŭ konas la kunmetadon de vortoj, sed en neniu lingvo ĝi estas tiel kutima kaj ŝatata kiel en la germana. La franca kaj la aliaj latinidaj lingvoj eĉ tute ne konas ĝin (vortoj kiel wagon—restaurant aŭ tire—bouchon estas faritaj laŭ tute aliaj principoj).

La vortfarado pere de afiksoj estas kaj en esperanto kaj en la germana tre kutima. Ambaŭ lingvoj posedas grandan nombron da afiksoj. Kelkfoje iliaj afiksoj korespondas ekzakte en la signifo, pli ofte ili havas diversajn signifanpleksojn. Kelkaj el la esperantaj afiksoj estas prunteprenitaj el la germana. Jen mi donas la korespondantajn afiksojn kun ekzemploj:

Jenaj esperantaj afiksoj ne havas ekzaktan korespondanton en la germana: ek—, —ad, —eg, —em, —er, —ig. Ili parte estas reprezentataj per nombro de aliaj afiksoj aŭ nebezonaĵaj. La korespondantoj de jenaj sufiksoj estas memstare uzablaj vortoj: —estro: partiestro = Partei—führer; —inda: laŭinda = lobens—wert; —ingo: torĉingo = Fackel—halter; —ido: elefantido = Elefanten—junges; —ujo: supujo = Suppen—schüssel. Führer, Wert, Halter, Junges, Schüssel estas memstaraj vortoj kaj ne meritas la nomon de sufiksoj.

Granda parto el la hodiaŭaj germanaj sufiksoj estis en malnova germana lingvo memstaraj vortoj, ekz. heit povis esti uzata izola kaj signifi eco. Iom post iom tiuj vortoj plej parte uzataj en kunmetaĵoj perdis sian akcenton kaj hodiaŭ ne plu povas vivi izole. En Esperanto la afiksoj ankaŭ estas survoje al perdo de sia memstareco. (Ekzakte parolate en esperanto afiksoj tute ne ekzistas, ĉar nun nememstaraj silaboj povas porti tiun nomon, sed por tradicio kaj praktiko mi retenis la malekzaktan ordigon). Jam nun oni en esperanto prefere diras ĉeoj anstataŭ estro, objekto anstataŭ aĵo, loko anstataŭ ejo, kontraŭo anstataŭ malo, ktp. Oni evitas uzi la esperantajn afiksojn izole kaj jam nun estas facile antaŭdiri, ke post malmultaj jarcentoj ili estos tute perdintaj sian memstarecon same kiel en la germana lingvo.

La rezulto de la mallonga esploro de vortfarado en esperanto kaj la germana montras ke la moderna germana lingvo kaj esperanto faras siajn novajn vortojn laŭ la samaj principoj. Tio ne estas hazardo, sed intenco de la kreinto de Esperanto, kiu grandparte uzis la germanan vortfaradon kiel modelon por la vortfarado en la internacia lingvo. La facileco de la vortfarado donas al niaj du lingvoj grandan flekseblecon, esprimkapablon kaj facile pligrandigeblan vortprovizon. En la germana lingvo oni helpe de vortfarado povas eviti la enkondukon de troaj internaciaj vortradikoj kaj anstataŭ ilin per novfaritaj hejmaj vortoj; ekz.: Hund—funk por radio; Schrift—leiter por redaktoro; Kraft—wagen por aŭto. En esperanto la grandaj eblecoj en la vortfarado «bligas havi relative malgrandan provizon de radikoj el kiuj oni tamen povas formi senfinajn novajn vortojn kaj esprimi ĉiujn pensojn».

La sola diferenco inter esperanta kaj germana vortfarado estas ke en esperanto per malpli granda nombro de afiksoj oni atingas eĉ pli grandan rezulton por racia logika utilligo de ili.

Estas interese observi, kiel en la esperanta vortaro franca kaj germana lingvoj kunlaboris. La franca lingvo donis la ĉefajn radikojn, la germana lingvo donis la principojn de vortfarado el tiuj radikoj.

Arthur BAUR.

Ĉiuj en AMIENS
la 1an kaj 2an de Majo 1937 !...

Une Profanation !

« ... L'Esperanto, où l'on a osé traduire les fables de La Fontaine ; c'est là une profanation. »

(Paroles prononcées par M. Vendryes, le 25 janvier 1912, à la Société Française de Philosophie, Bulletin, page 62)

Le Loup et le Chien LUPO KAJ HUNDO

Lupo havis nur ostojn kaj haŭton
Tiel bone la hundoj gardadis.
Li dogon renkontas fortan, belan, grasan,
Brilharan, nevole vojaĝerariĝintan.
Lin ataki, dispecigi
Ĝin bonkore la lupo faras ;
Sed li devis ekhalti,
Kaj hundego tia taŭgis
Por defendi sin sentime.
Lin do la lupo aliras humile,
Alparolas kaj lin gratulas
Pri l'bonstato, kiun li admiras.
« De vi sole dependas, Sinjoro,
Grasigi, kiel mi », la hundo rediris.
Forlasu l'arbaron, tre bone vi faros :
Viaj gefratoj ĉi-tie mizeras,
Malriĉegaj, senhavaj, plendindaj,
Difinitaj por morti malsate :
« Ĉar nenio certa, nek manĝo plenuŝa !
Ĉio per la pinto de l'glavo.

Min sekvu, kaj sorton pli bonan vi havos. »
La lupo demandis : « Mi kion do faros ? »
Kaj la hundo : « preskaŭ nenion ; forpeli
Bastonportantojn kaj almozulojn ;
Hejmanaron flati, plaĉi al la mastro.
Kaj pro tio, via salajro
Estos ĉiuspeca multe restajaro,
Kokidostoj, kolombostoj,
Krom multego da karesoj. »
La lupo imagas al si jam feliĉon,
Kiu lin kortuŝe plorigas.
Vojirante li vidas hundon kolon senhara :
« Kio estas » li diras. « Nenio. » « Nenio ? » « Malmulto. »
« Sed plie ? » « Ĉirkaŭkolo, kiu min ligas,
Eble kaŭzas kion vi vidas ». « Vin ligas ? » la lupo rediris ; ĉu do vi ne kuras
Kien vi volas ? » « Ne ĉiam ; tamen ne grave ! »
« Tiom grave, ke viajn festenojn
Mi neniel volas, kaj eĉ trezoron
Mi pro tia prezo ne volus. »
Post tio, la lupo forkuris
Kaj ankoraŭ nun kuras.

Tradukis, J. PARISOT.

Quelques expressions : Brillharan, poli au poil lustré ; vojaĝerariĝintan, qui s'était fourvoyé ; nevole, par mégarde ; ĝin bonkore farus, l'aurait fait volontiers ; hundego, le matin ; taŭgis, était de taille ; bonstato, embonpoint ; nek manĝo plenuŝa, pas de franchises lippées ; ĉio per la pinto de l'glavo, tout à la pointe de l'épée ; forpeli, donner la chasse à ; hejmanaro, ceux du logis (hejmo, logis + ano, membre + aro, groupe de) ; kokidostoj, os de poulet (kokido, poulet + ostoj, os).

Pour copie conforme,
H. MUFFANG.

DISTRAĴOJ

1. ENIGMO (de S-ro Cavier)

1. X x x x x x parto de preĝejo
2. x X x x x x preni el multaj
3. x x X x x x kaleŝkondukisto
4. x x x X x x malsupra parto de vegetaĵo
5. x x x x X x irigi iun kun si (sen finaĵo)
6. x x x x X per ili ni vidas
7. x x x x X ĉirkaŭ la kolo
8. x x x X x x vivanta en soleco
9. x x X x x x studenta en oficira lernejo
10. x X x x x x tute lordonj al
11. X x x x x x milda venteto
12. x X x x x x fiŝo
13. x x X x x x ligitaj pajloj
14. x x x X x x senkompense doni
15. x x x x X x bruna siropo
16. x x x x X nevariebla vorto (sen finaĵo)
17. x x x x X x nutra fluaĵo (sen finaĵo)
18. x x x X x x malvolvi laŭ la longo
19. x x X x x x antikva greka monero
20. x X x x x x palmpieda kortobirdo
21. X x x x x x popolo kiu migras de loko al loko
22. x X x x x x farita por esti imitata
23. x x X x x x beleta rakonto
24. x x x X x x malgranda semo
25. x x x x X x barbaro (sen finaĵo)
26. x x x x x X prepozicio
27. x x x x X x helpa kunsidanto de juĝisto (sen finaĵo)
28. x x x X x x tero konsiderata laŭ sia kvalito por kulturo.

Anstataŭigu la signojn x per sesliteraj vortoj.

La literoj kiuj anstataŭigas la grandajn X donas interesan procirkonstancan esprimon de S-ro Cavier al la legantoj de *N/E*.

2. DIVENU !

1. Kio falas en akvon sen disŝpruci ?
2. Dum kiu monato la infanoj babilas la plej malmulte ?

Sendu solvojn aŭ komunikajojn pri tiuj « distraĵoj » ĝis la 31^a de januaro, nur al nia kunlaboranto S-ro DAMMEREY, en BORRE, par Hazebrouck (Nord).

Solvoj de la Novembraĵoj konkursoj :

1. PROBLEMO. — Jen estas unu el la

2. SILAB-ENIGMO. — Koko, Ovo, Rano, Akvo, Napo, Salo, Apro, Lupo, Urso, Tigro, Ostro, Nukso, Aglo, Lardo, Camo, Ino, Ulo, Jaro.

La unuaj hteroj donas la jenan dezir-esprimon :

« KORAN SALUTON AL ĈIUJ »

SOLVINTOJ :

Ricevis 40 poentojn : F-ino Andrzejewski, en Amiens ; s-ro Bernard Georges, en Liévin ; f-ino Bévière, en Coudekerque-Branc. ; s-ro Bourlier Raoul, en Beauchamp ; s-ro Brunet, en Arras ; s-ro Bruynoghe, en Dunkerque ; s-ro Cappelaere M., en Malo ; s-ro Cavier M., en Hautmont ; f-ino Collette A., en Amiens ; f-ino Coquelet G., en Denmont ; f-ino Solio CIPERA, en PILSEN (ĉekoslavakio) ; s-ro Darras, soldato en Mont-Valérien ; s-ino Delavigne, en Longpré-l-C-Sts ; s-ro Delcourt, en Gravelines ; s-ro Delobel, en Jenlain ; s-ro Doye, en Anzin ; f-ino Duflos R., en Malo ; s-ro Dumouque, en Desvres ; f-ino Dumez, en Malo ; s-ro Haudréchy, en Longpré-l-C-Sts ; f-ino Herbart, en Dunkerque ; s-ro Henry, s-ro Marpent ; s-ro Humez A., en Douai ; s-ino Irlande Magdaleno, en Poix ; s-ro Jonckiert, en Arras ; f-ino Lavallart Huguette, en Amiens ; s-ro Laurent Marcel, en Montdidier ; f-ino Leroux, en Desvres ; s-ino Lathé, en La Cappel (Aisne) ; s-ro Pauvrehomme, en Toulon (Var) ; s-ro Pavis, en Rennes ; s-ro Quintard, en Maubeuge ; s-ro Rossignol, en Le Havre ; s-ro Tremon, en Caudry ; f-ino Triquet, en Rosendaël ; f-ino Vaille, en Saint-Quentin ; f-ino AFVAN ZELAND, en ROTTERDAM (Nederlando) ; s-ro Vergez Edouard, en Boulogne-sur-Mer ; Anonima samideano, el Savojo (Savoie).

Ricevis 30 poentojn : S-ro Roucoux Pierre, en Longpré-l-C-Sts.

ESPERANTLINGVAJ ELDONAĴOJ

pri Itala Turismo

Ni informas niajn abonantojn kiuj deziras ricevi senpage diversajn broŝurojn en Esperanto kaj la belegan ilustritan revuon « Italia » eldonitajn de la ĝenerala Direkcio, por turismo en Roma, ke ili devas sin turni rekte al E.N.I.T., 49, avenue de l'Opéra, Paris (2^e).

AM PORTU LA VERDAN STELON

Scienca Angulo

Pri la Spinaj Nervoj

La sveda profesoro Gösta Häggqvist mezuris kaj klasigis ne malpli ol 17.000 nervfadenojn en la medolo de la homa spino.

La profesoro laŭ sagaca sistemo koloris maldikajn tranĉaĵojn de la spino kaj fotografiis ilin kun 750-obla pligrandigo, kaj tiel estis eble al li mezuri la diametron de tiuj nervoj. Tiamaniere li eltrovis, ke ilia dikeco varias de unu milono ĝis dudek milonoj de unu milimetro. Tiu analizo laŭdire estas konsiderinde grava por fiziologio kaj patologio, nome kun konsidero al la fakto, ke la rapideco de la nervimpulsoj estas pruvita rekte proporcia al la dikeco de la nervoj. Tiel, nervo kun diametro de 20/1000 de unu milimetro portas la nervimpulson al la cerbo kun rapideco de 90 metroj sekunde, dum la rapideco en 10/1000 milimetra nervo estas nur 22,5 metroj, kaj en 1/1000 milimetra nervo tiel malalta kiel 0,2 metroj sekunde.

Profesoro Häggqvist trovis, ke nervfadenoj de tre variaj diametroj ekzistas kune en ĉiuj partoj de la spino, sed trovis la maldikajn multe pli multnombrajn ol la dikajn.

La rezultoj akiritaj de la sveda profesoro vekis konsiderindan atenton inter liaj sciencaj kolegoj.

(Sved-Internacia Gazetservo).

Por la Filatelistoj...

VORTARETO : Koloroj (daŭrigo)

Pâle	pale
Vif	malpale
Clair	hela
Sombre	malhela
Foncé	malhela
Terne	senbrila
Teinté	koloreta
Mat	malbrila
Bleuté	blueta
Bleuâtre	dubeblua
Blanchâtre	dubebianka
Noirâtre	dubenigra
Rougeâtre	duberuĝa
Verdâtre	dubeverda
Gris ardoise	ardezogriza
Gris ardoise clair	hela ardezogriza
Jaune citron	citronflava
Jaune pâle	pale flava
Jaune serin	fringelflava
Rose vif	malpale roza
Rose carminé	karminroza
Vert olive	olivoverda
Violet foncé	malhela viola
Bleu d'outremer	ultramara
Bleu de Prusse	prusblua
Bleu terne	senbrile blua

La Filatelisto



D-ro Wilhen Koehler raportis la sekvantajn anekdoton en Frankfarta gazeto :

Antaŭ kvindek jaroj mi ŝipveturis kun la reĝo Oscar, el Sudujo Algerion. La ŝipestro ne konis la reĝon. Li salutis tre ĝentile kaj komencis la jenan interparoladon :

— Sinjoro, eble mi eraras, sed al mi ŝajnas, ke mi vidis vin sur strato de Marseille kun oficira uniformo ?

— Povas esti, sinjoro ŝipestro, ĉar hieraŭ matene mi faris vizitojn kaj surmetis deĵoran uniformon.

— Ĉu mi povas demandi kian ?

— Admiralan.

— Admiralan ! Sed vi ŝajnas nur dudek-kvin jara, sinjoro ! Vi certe estas eminenta kaj lertega maristo !

— Mi volus, modeste respondi la reĝo, ŝuldi mian admiralan uniformon nur al mia marista kapableco ; sed mia nomo devigas min surmeti ĝin.

— Ĉu estas permesite seliĝi pri via nomo, sinjoro ?

— Mi estas nomata Bernadotte.

— Bernadotte ! Vi do estas el la marŝala familio ?

— Jes, li estas mia avo.

— Sed li estas patro de l' reĝo de Svedujo !

— Sed ia dubo, kaj mi estas frato de l' reĝo.

— Parencojn vi havas ankoraŭ en tiu-ĉi lando ? Via Princa Moŝto.

— Mi scias. Bedaŭrinde, mi ne konas ilin ĉiujn.

— Se tio ĉi povas esti al vi agrabla, mi prezentos al vi unu el viaj kuzoj.

— Jes, tre kontenta mi estos.

La ŝipestro iris al la voktubo kaj kriis forte :

— Venigu Bernadotte !

Tuj aperis viro, kun vizaĝo nigra pro fulgo, nuda ĝis la zono. Li aliris la ŝipestron, salutinte, atendis senmovo.

— Via Princa Moŝto, mi havas la honoron prezenti al vi vian kuzon Bernadotte ! diris la ŝipestro, kaj li malproksimiĝis.

Bedaŭrinde, ni ne scias kio okazis poste inter la kuzoj.

(el *L'Etoile Espérantiste*).

Konsiloj al propagandistoj

(sekvo)

Nun pri praktikaj artoj :

Kiam oni volas konstrui remparon, oni alportigas pezajn ŝtonojn, oni elfosas profunde teron, oni uzas mortaron, k. t. p. ; tio estas granda laboro. Jen rimedo pli simpla : prenu remboleton, remu du foje : ĝi estas REMPARO.

Inter vi, gesamideanoj, ekzistas certe fotografistoj ; ĉu vi uzis kelkfoje fotojn da ranoj ? Ne... Tamen pripensu esperante... sendube por fotografi, vi uzis kelkfoje EKRAŬOJN.

Mastro de libraro amas ĝenerale katojn. Jen unu motivo : kato mortigas musojn, kiuj estas malamikoj de libroj ; sed esperantistaj amikoj de libroj, se ili estas ordemaj, havas duan motivon : ili amas katojn, ĉar ili ŝatas KATALOGON.

A. CHAIGNEAU.

(daŭrigota)

ĈE AŬGURISTINO.



Li. — Kiam la registaro enkondukos la instruadon de Esperanto en la lernejojn ?

Ŝi. — Mi ne povas respondi, ĉar mi timas esti persekutata pro la diskonigo de falsaj novaĵoj.

DELAVIGNE-POIRET, Imprimeur-Gérant
Longpré-les-Corps-Saints (Somme) - France



PROBABLAJ PROGRAMOJ DUM DECEMBRO 1936

Horoj laŭ franca vintra tempo (G. M. T.)

Ĉiusemajnaj dissendoj

DIMANĈO

9.00 - 9.15 Radio-Kortrick 204 m. E. kroniko.
9.40-10.00 Lille, 247 m. Parolado, kurso kaj informoj, de F-ino Andrée kaj S-ro H. Carnelle.
10.45- Lyon P.T.T., 463 m. Kurso.
13.00-13.15 C. T. 3 A. Q. (Funchal) 75 m. Inf.
21.20-22.20 Leningrad, 1293 m. Literaturmuzika vespero.

LUNDE

14.40-15.00 Wien, 506 m. kaj ĉiuj aŭstriaj stacioj. Kurso.
17.30-17.35 Genève Sottes, 443 m. Kurso.
18.30-18.50 Radio-Lyon, 215 m. Kurso.

MARDE

17.00-17.15 Moravska Ostrava, 269 m. Paroladoj pri Ĉeĥoslovakujo.
19.00-19.10 Tallin, 410 m. Pri Estonio.
19.00-19.20 Hilversum II, 1875 m. Kurso.
20.40-21.00 PRA-3 (Rio de Janeiro), 366 m. kurso.
21.45- LV-2 (Cordoba). Informoj.
22.30-22.45 PRF-5 Rio de Janeiro, 31 m. 58. Ekonomiaj informoj kaj kantoj.

MERKREDE

11.00-14.20 Paris-P. T. T., 431 m. - Alpes-Grenoble, 514 m. - Limoges-P. T. T., 335 m. - Nice-La Brague, 253 m. Kurso (C. Rousseau).
20.00-20.15 L. T. I. Radio del Litoral (Rosario) Informoj.
20.10-20.30 Barcelona, 42 m. Informoj.
20.30-20.45 C. T. 3 A. Q. (Funchal) 75 m. Inf.
21.50-22.20 Leningrad. Parolado.

GRAVA — AŬSKULTU, DANKU KAJ GRATULU LA STACIOJN..

Le Poste que vous possédez
vous permet pas l'écoute de toutes les émissions espérantistes ?
Remplacez-le par le Poste "RENOVOX"...

Voir annonce, page 4 de la couverture.

NE FORGESU NIAN ALVOKON, paĝo 5.

VARBU. VARBU ABONANTOJN.

JAŬDE

20.45-21.00 Radio-Kaunas, 207 m. Informoj.
18.05-18.20 Roma, 420 m. Priturisma parolado 2 R. O. (Rome) 31 m. 13. Relajso de Roma.

VENDREDE

20.30-20.45 C. T. 3 A. Q. (Funchal) 75 m. Inf.
20.45-21.00 Radio-Klaiped. 531 m. Informoj.
21.50-22.20 Leningrad. Parolado.

SABATE

18.05-18.20 Roma, 420 m. Priturisma parolado 2 R. O. (Rome) 31 m. 13. Relajso de Roma.
20.10-20.30 Barcelona, 42 m. Informoj.

Marseille P. T. T., 400 m., les mardis 5 et 19 janvier, 20.00-20.15, causerie, par M. Bourdelon.

BRNO (325,4 m.)

PRAHA I (470,2 m.)

MOR. OSTRAVA (289,2 m.)

7^{an} de januaro, 22.15-23.30 :

VENDITA FIANĈINO

Komika opero en 3 aktoj
Muzikon komponis Bedrich Smetana
Teksto de Karel Sabina
Esperanta traduko de Jiri V. Šamla
Ludos kaj kantos anoj de Trakt kaj de landa operejo. Kunludos orkestro de la Brna radiostacio, estrata de Jan Plichta.

Nordfranca Esperantisto *est enŝovita* *ĉiu monato*

à titre de propagande, à de nombreuses Sociétés, aux Syndicats d'Initiative, aux Chambres de Commerce, aux principaux Fonctionnaires, Consuls, Négociants, Industriels, Hôteliers, Coiffeurs, à de nombreux Groupes Esperantistes de France et de l'Étranger.

Fait un service régulier d'échange avec les autres journaux.

SI vous faites insérer une annonce à cette place, elle sera certainement remarquée...

**PETITE DÉPENSE
GROS PROFIT**

Tous renseignements :

Imprimerie de "Nordfranca Esperantisto"

HOTELS RECOMMANDÉS

à **ABBEVILLE** :

HOTEL DE FRANCE

Rue de l'Hôtel-de-Ville

DINOUARD, Propriétaire
Téléphone 42

à **AIRAINES** (Somme) :

HOTEL DE L'ÉCU DE FRANCE

Place Aristide-Briand

R. TUEUR, Propriétaire
Téléphone 17

Ni.E por vivi nepre bezonas ANONCOJN

Samideanoj, kiuj rilatiĝas kun gravaj komerc-firmoj, ĉe kiuj ili povas akiri anoncojn estas insiste petataj sin konigi al la Administracio de Ni.E, donante ĉiujn sciigojn

RADIO-APARATO « RENOVOX »



Preciza reguligo

Bele aspekto

ALTRKVALITA MATERIALO

6 lampoj

CIAJ ONDOJ

Variibla Selekteco

Amerikaj lampoj

Mezgrandaj frekvencoj

(kun fono)

165 kilocikloj

Antaŭ selektigilo efika

Diverskolora cifereplato

7 kaj 14 kilocikloj per komutatoro

Luma akord-indikilo

Duobla toneco - Elektro-dinamo

Grandmodela ĉiŝparolilo, haviganta nekompareblan muzikecon, kiu igas ĉiun modelon vera radio-aparato de muzikamantoj

PREZO : 2.035 FR.

10 %-a rabato por Ni.E-abonantoj

Anciens Etablissements

Lavoix & Renouard
49ter, Rue d'Arras -- DOUAI

ESPERANTO - ĈAMPANO

Grand 1^{er} cru - Unua Vinberregiono

Klasigita en 100 % kategorio

Laŭ gustoj : Dolĉa ; Duondolĉa ; Maldolĉa

Preztoj en Ruims :

Carte verte (verda kapuĉo) po botelo, 10. fr. fk

Mendu al samideano

R. CHANCE, 3, rue René-Bourgeois, REIMS (Francujo)

Pago al R. Chance, Mailly-Champagne (Marne)

Poŝtĉek-konto : Nancy 334-72

M. MAX TAILLEUR

**16, Rue Gambetta
Téléphone 603 LENS (P.-de-C.)**

PORTO VASMONTE

H. DE VASCONCELLOS, O. PORTO

Agent général : C. DOLPHENS

39, rue Gustave-Jonequet, à LILLE